Post kelkhora dormo li reaperis ĉe la pordo, por demandi pri la kuracato. "Bone estas," certigis lin la helpisto. Ĝuste tiam aperis servosoldato, salutante: "Generalo Hodler plej respekte deziras vidi D-ron Gage tuj ĉe la stabejo pro urĝa afero." " Dankon, kamarado," diris la doktoro, "Mian plej altan estimon al Generalo Hodler kaj diru al li, ke mi rapidas," poste, turnante sin al Imogen, "Observu Karlon kvazaŭ min ĝis mia reveno, kaj Dio benu vin!" Li foriris. La fortanima, bela vizaĝo de l' flegistino ekbrilis per espero kaj kuraĝo: "Kara Noble, mi bone zorgos pro vi vian pacienton," ŝi promesis, kaj iris al lia lito.

Dum multaj tagoj kaj noktoj ŝi servis ĉe la vundita sviso. Tage li restis pleje senkonscia, sed nokte li deliris kaj multe parolis, kvankam eĉ ne unu vorton ŝi povis kompreni. Ofte venis viziti lin lia fratino, sed li ŝajnis ne koni ŝin kaj, kiom ajn ŝi penis, ŝi ne povis kompreni liajn parolojn. Kia fenomeno fuŝis lian langon? Franca, germana, itala — ĉiuj svisaj idiomoj maltrafis ĉe li—per nenia signo li montris, ke li kaptas signifon. Ŝi sciis, ke li ne estas surda; li bone aŭdis, sed li restis muta aŭ parolis ian jargonon. Eble li perdis la prudenton.

Malfeliĉa Karl! Li estis aminta Imogenon per blinda, sendeturniĝa amo, nur vane. Ŝi informis lin milde kaj afable, ke ŝi neniam povos esti lia, ke tuta ŝia amo kaj ambicio estas al la Ruĝa Kruco kaj la homaro. Sed jen alia strangaĵo.—Jam de la unua nokto, kiam ŝi sidis apud lia lito, survenis sur ŝin ŝanĝo—ŝanĝego. Kiom ajn ŝi penadis, ŝi ne povis forpeli misteran senton, kiu nun allogis ŝin al li. Ŝiaj okuloj montris al ŝi la konatan Karlon, sed ĉu kuŝanta mortsimile en senkonscio, ĉu babilanta en deliro aŭ frenezo, li jam ŝajnis al ŝi aliulo. Ŝi iom post iom kaj konstante ekpensadis pri la vundita homo ĉe la obtuza lumo de l' noktolampo kvazaŭ li prenas la formon de unu, kiun ŝi forlasis antaŭ jaro kun koragonio. Ŝi imagis, ke jen en la hospitalo antaŭ ŝi kuŝas ŝia persa princo, Kapitano Artebesus el Teheran.

(Daŭrigota.)

## GRAVAJ ŜTATDOKUMENTOJ

### La Deklaro pri Sendependeco

Deklaro de la Reprezantantoj de Usono, en Kongreso kunvenintaj, akceptita 4 Julio, 1776.

Kiam en la historio de l' homaro necesiĝas, ke unu popolo rompu la politikajn ligilojn, kunigintajn ĝin kun popolo alia, kaj prenu inter la regnoj de la tero tiun apartan kaj egalan rangon, sur kiun la leĝoj de l' naturo kaj de la Dio de l' naturo ĝin rajtigas, deca respekto al la opinioj de l' homaro postulas, ke ĝi deklaru la kaŭzojn, kiuj devigas ĝin al tia apartiĝo.

Ni kredas la jenajn verojn memkompreneblaj: ke ĉiuj homoj estas kreitaj egalaj; ke ili ricevis de sia Kreinto kelkajn neforigeblajn rajtojn; ke inter ĉi tiuj estas la vivo, la libereco kaj la celado al la feliĉo. Ke por ŝirmi tiujn rajtojn registaroj estas fonditaj ĉe la homoj, ricevante siajn justajn povojn el konsento de la regatoj; ke kiam ajn ia ŝtatoformo fariĝas detruema por tiuj celoj, tiam la popolo rajtas ĝin ŝanĝi aŭ nuligi, kaj fondi ŝtaton novan, bazante ĝin laŭ

Digitized by Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

tiaj principoj kaj organizante ĝiajn povojn tiaforme, kiel ŝajnos al ili la plej praktike por atingi sian sendanĝerecon kaj feliĉon. La saĝo ja admonus, ke regadoj longe starintaj ne estu ŝanĝataj pro malgravaj, efemeraj kaŭzoj; sekve la monda sperto montris, ke oni prefere inklinas toleradi, dum malbonoj estas tolereblaj, ol liberigi sin, nuligante la formojn, al kiuj oni kutimas. Sed kiam longa serio da trouzoj kaj uzurpoj, kun ĉiam unu konstanta celo, esprimas deziron submeti popolon al absoluta despotismo, ĝi havas rajton, ĝi havas devon, forjeti tian regadon kaj provizi novajn ŝirmojn por sia estonta sekureco. Tia estadis la pacienca tolerado de niaj kolonioj, kaj tia jam la neceso, kiu devigas ilin ŝanĝi siajn antaŭajn ŝtatsistemojn. La historio de la nuna reĝo de Granda Britujo estas historio de multfojaj malutilagoj kaj uzurpoj, ĉiuj celantaj rekte starigon de absoluta tiranismo super niaj ŝtatoj. Por tion pruvi, oni liveru faktojn al honesta mondo.

Li rifuzis konsenton al leĝoj la plej sanaj kaj necesaj por la publika bono.

Li malpermesis, ke liaj vicreĝoj aprobu leĝojn aktualajn kaj urĝajn, krom se oni prokrastos ilian plenumadon ĝis akiro de lia konsento; kaj eĉ prokrastitajn, li tute neniom atentis ilin.

Li rifuzis aprobi aliajn leĝojn pro la bezono de grandaj distriktoj, krom se iliaj anoj rezignos la rajton de reprezentiĝo en la kolonia parlamento —rajton netakseblan por ili kaj timindan nur de tiranoj.

Li kunvokis leĝfarantarojn al lokoj nekutimaj, maloportunaj kaj malproksimaj de iliaj publikaj arhivoj, sole nur por lacepeli ilin ĝis konsento kun liaj aranĝoj.

Li eksigis multfoje reprezentantajn ĉambrojn tial, ke ili kontraŭstaris kun vira firmeco liajn entrudiĝojn en la rajtojn de la popolo.

Li rifuzis tra longa daŭro post tiaj eksigoj la elektigon de aliaj,—pro kio la leĝfaraj povoj, ne nuligeblaj, refalis sur la ĝeneralan publikon por plenumado; dum la ŝtato restis, intertempe, elmetita al ĉiuj danĝeroj de invadoj el ekstere kaj malordoj interne.

Li penis malhelpi la enloĝigadon de niaj ŝtatoj; en tiu celo ĝenante la leĝojn por civitanigo de fremduloj; rifuzante aprobi aliajn por akceli enmigron ĉi tien, kaj malfaciligante la kondiĉojn de novaj terasignoj.

Li ĝenis la juĝplenumadon, rifuzante aprobi leĝojn por starigi juĝajn povojn.

Li faris, ke la juĝistoj dependas sole de lia volo, por okupado de siaj oficoj kaj la kvanto kaj pagado de siaj salajroj.

Li kreis multegon da oficoj novaj, kaj sendis tien svarmojn da oficistoj por turmenti nian popolon kaj formanĝi ĝian havon.

Li tenis inter ni, en pacaj tempoj, konstantajn armeojn, sen konsento de niaj parlamentoj.

Li klopodis fari la militistan povon memstara, eĉ supera, antaŭ la povo civila.

Li kunagis kun aliaj por submeti nin al regado fremda je niaj konstitucioj kaj nekonfesata per niaj leĝoj; donante sian aprobon al iliaj agoj de pseŭdo-leĝfarado:

Por loĝigi ĉe ni grandajn armitarojn;

Por ŝirmi ilin, per ŝajnproceso, de puno pro mortigkrimoj kontraŭ la loĝantoj de niaj ŝtatoj;

Por ĉesigi nian komercon kun ĉiuj partoj de l' mondo;

Por trudi impostojn sur nin sen nia konsento;

Por senigi nin multokaze je la utiloj de popola juĝantaro;

Por transporti nin pretermare, por juĝado pri tiel nomitaj ofendoj;

Por eksigi la liberan sistemon de l' anglaj leĝoj en najbara provinco, fondante tie regadon arbitran kaj plivastigante ĝiajn limojn, por fari ĝin samtempe ekzemplo kaj taŭga ilo por enkonduki tian saman absolutismon en niajn koloniojn;

Por depreni niajn ĉartojn, nuligi niajn plej valorajn leĝojn, kaj ŝanĝi radikale la formojn de niaj regadoj;

Por interrompi niajn proprajn parlamentojn kaj proklami sin rajtigitaj leĝfaradi por ni ĉiel ajn.

Li abdikis tie ĉi la reĝecon, proklamante nin ekster sia ŝirmado kaj militante kontraŭ ni.

Li prirabis niajn marojn, dezertigis niajn bordojn, bruligis niajn urbojn kaj detruis la vivojn de nia popolo.

Li ĝuste nun transportas armeojn da fremdlandaj dungsoldatoj, por fini la farojn de morto, ruinigo kaj tiraneco, jam komencitajn per cirkonstan-

Digitized by Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

coj de krueleco kaj perfido apenaŭ egalitaj en la plej barbaraj epokoj, kaj tute neindaj je la estro de nacio civilizita.

Li devigis niajn samcivitanojn, kaptitajn sur la libera maro, porti batalilojn kontraŭ sia patrujo, fariĝi la ekzekutantoj de siaj amikoj kaj fratoj, aŭ fali mem per iliaj manoj.

Li instigis internan ribeladon ĉe ni, kaj klopodis venigi kontraŭ la loĝantojn de niaj landlimoj la senkompatajn indianajn sovaĝulojn, kies konata militregulo estas sendistinga detruado de ĉiuj aĝoj, seksoj kaj statoj.

Sur ĉiu paŝo de ĉi tiuj premoj ni petskribis pro kompenso en la plej humilaj vortoj; niaj multfojaj petoj estas responditaj nur per multfoja maltilado. Regnestro, kies karakteron signas ĉiu ago propra je tirano, ne taŭga estas por regi popolon liberan.

Kaj ni ankaŭ ne malatentis niajn britajn fratojn. Ni avertis ilin de tempo al tempo pri penoj de ilia parlamento arogi super ni senrajtan aŭtoritaton. Ni memorigis al ili la cirkonstancojn de nia elmigrado kaj eklogado ĉi tien. Ni apelaciis al ilia natura justeco kaj grandanimeco, kaj ni jejuris ilin per la ligiloj de nia komuna raso, ke ili malkonfesu tiujn uzurpojn, kiuj nepre rompos niajn kuniĝojn kaj komunikiĝadon. Sed ankaŭ ili estadis surdaj por la voĉo de l' justeco kaj de l' samsangeco. Ni devas tial akcepti la neceson de reciproka apartiĝo, kaj rilati al ili, kiel al la cetera homaro—nome malamikoj en milito—en paco amikoj.

Ni tial, reprezentantoj de Usono, en ĝenerala Kongreso kunvenintaj, alvokante la Plejaltan Juĝiston de la mondo pri la virteco de niaj intencoj, jen, en la nomo kaj per la aŭtoritato de la bona popolo de niaj kolonioj, publikigas kaj deklaras, ke niaj unuigitaj kolonioj estas, kaj rajte devas esti, liberaj kaj sendependaj ŝtatoj; ke ili staras kvitigitaj je ĉia ŝuldo al la brita krono, kaj ke ĉia politika ligiteco inter ili kaj la ŝtato de Granda Britujo estas, kaj devas esti, tute rompita, kaj ke, kiel liberaj kaj sendependaj ŝtatoj, ili havas plenan povon fari militon, fari pacon, negoci aliancojn, fondi komercon, kaj ĉiel alie agi laŭ la rajtoj de memstaraj ŝtatoj. Kaj por subtenadi tiun Deklaron, kun firma fido al la ŝirmado de l' Dia Providenco, ni reciproke ĵurpromesas al ni nian vivon, nian havon kaj nian sanktan honoron.

Subskribita de

John Hancock, Prezidanto,

kaj 55 delegitoj el 13 kolonioj (ŝtatoj).

---

## PREĜO DE ĈEVALO

de

C. H. Matchett

Al vi, mia Mastro, mi faras mian preĝon.

Nutru min, donu al mi akvon, zorgu pri mi kaj en la fino de l' ĉiutaga laboro donu al mi rifuĝon, puran sekan liton kaj stalon sufiĉe vastan, ke mi povu kuŝi komforte. Ĉiam estu al mi bona. Parolu al mi, ĉar via voĉo ofte signifas por mi same kiel kondukilo. Iafoje dorlotu min, por ke mi povu ĝoje servi vin kaj lerni vin ami. Ne ekskuu la kondukilojn, kaj ne vipu min, kiam mi supreniras. Neniam batu nek piedfrapu min, se mi ne komprenas tion, kion vi volas; sed montru al mi, kiel mi povas kompreni vin. Observadu min kaj se mi ne bone servas vin, serĉu trovi, ĉu io malboniĝis ĉe la jungaĵo aŭ miaj piedoj. Ne forprenu de mi la rajton uzi libere mian kapon. Se vi insistas, ke mi portu okulŝirmilojn, por ne posten rigardi (kio ja ŝajnas al mi nenecesa severaĵo), almenaŭ, mi petegas vin, zorgu, ke la iloj ne premados miajn okulojn. Ne troŝarĝu min, nek ligu min kie akvo gutos sur min. Bone zorgu pri hufferoj. Kiam mi ne manĝas, esploru miajn dentojn; eble ili ulceliĝis, kaj vi bone scias, kiel tio doloras. Ne ligu mian kapon en pozicio nenatura, nek forprenu de mi la plej bonan defendon kontraŭ la muŝoj kaj kuloj, fortranĉante la voston. Mi ne povas informi vin, kiam mi soifas, do donu al mi ofte puran malvarman akvon. Mi ankaŭ ne povas sciigi vin vorte, kiam mi malsanas, tial observu min, ke per aliaj signoj vi eksciu mian farton. Ŝirmu min de la varmega suno, kaj kovru min kiam mi staras en vetero frosta. Neniam metu en mian buŝon glaciecan enbuŝaĵon, sed antaŭe varmigu ĝin, tenante ĝin iom da tempo en viaj manoj. Mi penas porti vin kaj viajn ŝarĝojn senmurmure kaj pacience atendas vin longajn horojn en ĉia vetero. Mi vivas nur por servi al vi. Do en la fino, ho mia Mastro, kiam

Digitized by Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

mi per maljunaĝo ne plu utilas vin, ne forlasu min. Ne malnutru min, nek vendu min al kruela posedonto, por turmenti kaj malnutri min ĝis la morto; sed prefere, ho Mastro, mortigu min tuj en sendolora maniero. Kaj via Dio vin benos nun kaj poste. Ne konsideru min profanemulo, se mi ĉion ĉi petas en la nomo de Tiu, kiu estis naskita en stalo. Amen.

## FOR THE BEGINNER

**Our readers are invited to send us any difficulties encountered in their study of the international language, inquiries being answered promptly and completely in this department of the magazine.**

### WORDS WITH FALSE ANALOGIES

**(Continued)**

| | |
|---|---|
| Nikolao Petroviĉ ordonis alporti kelke da boteloj de **portero.**—P. kaj F. p. 112. | Nicholas Petrovich ordered up several bottles of porter. |
| Mi **praktikas** la medicinon. | I am practicing medicine. |
| (This word is commonly misapplied by English speakers for the sense of **sin ekzerci je.)** | |
| Mi **pretendas** esceptiĝon. | I claim exemption. |
| La **prezento** de la donaco faris al mi grandan plezuron. | The presentation of the gift gave me great pleasure. |
| Ĉe ni la **principa** formo de ĉiu konstruaĵo estas la detranĉita piramido.—Far. III, 110. | With us the basic form of every structure is the truncated pyramid. |
| Via eraro estas principa. | Your error is one of principle. |
| Oni devus fari al Herhor kaj Mefres **proceson** pri ŝtata perfido.—Far. III, 63. | Herhor and Mephres ought to be indicted for high treason. |
| Homoj, kiuj ofte ĝis nun estis tute **prudentaj**, ricevas atakon de frenezo.—F. K. 65. | People who hitherto were often quite sane suffer an attack of madness. |
| Nin ĉiam **ravas,** kion ni ne havas.—P. E. 616. | Distance lends enchantment to the view. |
| Vi havis pli grandan laboron, ol la solan skribadon de **recepto.**—F. K. 111. | You had a bigger job than just writing a prescription. |
| Sara alportis la grandan arĝentan lavopelvon, riĉe ornamitan per **reliefaj** oraj figuroj.— R. de B. 247. | Sarah brought the great silver wash-basin, richly adorned with raised gilt figures. |
| La bankiero likvidis la aferojn kaj vivas nun de la **rento.**—Vort. | The banker has closed out his business, and is now living on his income. |
| La lupago el la domo estas ŝia sola rento. | The rent from her house is her sole income. |
| **Resti** kun leono ne estas ripozi. | To stay with a lion is not to rest. |
| Tia **rezono** estas nemotivita. | Such a point of reasoning is not based on reason. |
| La maŝinisto rimarkis du grandajn lumojn antaŭ la lokomotivo.—U. L. 8. | The engineer noticed two large lights in front of the engine. |
| Unu el ili lasis lin kun tri rompitaj **ripoj.**—B. de l'V. 34. | One of them left him with three broken ribs. |
| Mia sola rimedo estis la ĉef-**risorto** de mia poŝhorloĝo. | My only resort was the mainspring of my watch. |
| Mi **riverencis** kun respektego. | I bowed with reverence. |

Digitized by Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

Nia ŝipo restis tutajn horojn en Yarmouth-**rodo.**
Kurinte mi trans**saltis** la fosajon.

Post unu salto mi estis transe.
Nigran kornikon **sapo** ne blankigos. —P. E. 303.
Ĉu vi legis **la Sentencojn** de Salomono?
Sinjorino Anneto . . . ekvidis antaŭ si eksterordinare **simpatian** viron. —F. K. 125.
Al kia **sorto** vi min kondamnis?

Kuru en la ĉambron kaj elportu el tie la **spadon.**—Rev. 17.
Abelujon ne incitu, amason ne **spitu.** —P. E. 1191.
Ŝia patro estis en la **stabo** de MacMahon.—U. L. 126.
La marko estis Usona, la poŝta **stampo** el Nov-Jorko.
La verdan **standardon** tre alte ni tenos.—F. K. 459.
Troa **streĉado** de la okuloj . . . povas kaŭzi kronikan kataron.—F. K. 232.
La fervojoj **strikis.**—En Mal. 15.
Se la vulkanoj **ŝtopiĝos** . . . la tero krevos.—F. K. 184.
Sutu iom da tera polvo sur la okulon.—F. K. 26.
Via **tarifo** estas tro alta.
Ne konduku nin en **tenton.**
Ni ŝarĝis rekte el la veturilo en la **vagonon** en la fretejo.
Tiu **vesto** ne estas **veŝto; ĝi** estas surtuto.
Ilia estro estis instruisto, kun la gestoj de **vulgara** laboristo.—P. A. 153.
Nomu nenion vulgara nek malpura.
Vulgareco ne estas maldelikateco.

Our ship lay for hours in Yarmouth Roads.
With a running jump I cleared the ditch.
With one jump I was across.
Can a leopard change his spots?

Have you read the Proverbs of Solomon?
Madame Annette perceived in front of her an extraordinarily attractive man.
What sort of a fate have you condemned me to?
Run into the room and fetch out the dress sword.
Don't stir up a beehive, nor defy a mob.
Her father was on MacMahon's staff.
The stamp was United States, the postmark New York.
Our standard green full high we'll hold.
Too great an eye strain may cause chronic catarrh.

The railroads struck.
If the volcanoes get stopped up, the earth will burst.
Sprinkle some earth on the eye.

Your charges are too high.
Lead us not into temptation.
We loaded direct from the wagon to the car in the freightyard.
That garment is not a vest; it is a coat.
Their leader was a teacher, with the movements of a common working man.
Call nothing common nor unclean.
Commonness is not vulgarity.

---

## SOME COMMON MISTAKES

### Grammar

(1) Beginners are apt to express the indirect object as in English with the objective case. Take the sentence, "Give him the book" — here "book" is the direct object of the verb "give," therefore rightly expressed by the objective **libroN;** but "him" is really an idiomatic abbreviation of "to him" (as shown when the words of the sentence are differently arranged —"Give the book to him"), therefore objective case in form rather than sense. It is true that in English prepositions govern the objective case as well as do verbs, but this too is a matter of idiom rather than logic. In Esperanto all prepositions govern the nominative, and the case of the indirect object (**la dativo** — P. G. rule 2) is always expressed by **al** and the nominative. So the sentence would be rendered, "Donu **al li** la libron."

(2) Be careful of the preposition after **plej:** often beginners use **de,** which is wrong. In Ekz. sec. 10 we have **"El** ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la plej juna." The correct preposition ofter **plej** is **el.**

(3) Occasionally in rendering numbers like "one hundred and ten," "one thousand and twenty-five," and the like the **komencanto** is apt to write **UNU cent dek, UNU mil dudek kvin.** The **unu** here is as superfluous as if one rendered "fifteen" **UNU dek kvin:** for **cent** and **mil** imply unity in their column, unless qualified by **du** or more.

(4) Do **not** use **Ci,** but **Vi,** in addressing the Deity. The use of **ci** in Esperanto is practically negligible.

(5) Perhaps the commonest earmark of the inexperienced Esperantist is the frequent use of the compound tenses, active voice. They are seldom used by good Esperantists for two reasons: they are clumsy, and they are almost never necessary. It is true that their use is grammatically unobjectionable, and it is simply a question of good style. Section 24 of the Ekzercaro is especially worth noting in this connection. Note how simple tense alternatives are furnished in every instance, showing that Dr. Zamenhof recommended simple tenses wherever just as clear as the compound.

---

**Vocabulary**

In this and past numbers we have quite extensively treated Esperanto words apt to be misapplied on account of English words that look or sound similar. Below are a few other words misused more or less for other reasons, together with an occasional hint about affixes.

(1) **Akrido** is a locust, not a grasshopper. Strange to say, **lokusto** is a grasshopper.

(2) **Artifika** is apt to be misused in the sense of "artificial." See Kabe's Vortaro on this adjective. For "artificial" the best writers use **arta** (as in F. K.) or **artefarita.**

(3) **Biskvito** means a biscuit in the British sense (**Usone** a cracker), not biscuit as in this country. The latter, being a purely American eatable, has no International name.

(4) **Ĉu** is the verbal equivalent of the question mark .. "?" Never use it as a synonym **for aŭ,** where no question is implied. The writer has seen such sentences as "Donu al mi ĉu la libron ĉu la krajonon," where ĉu is incorrect, and **aŭ....aŭ** should be used.

(5) For the sake of clearness never use **de** in the sense of "by" save immediately following a verb in the passive voice.

(6) Distinguish **dungi** and **lui,** the former meaning to hire (a person), the latter to rent (a thing — usually a house or room).

(7) **Fremda** does not necessarily imply " of another nationality;" it means simply "strange" (in the sense of unknown). So **fremdulo** is not necessarily a foreigner, but merely a stranger. (A foreigner is **alilandulo** or **eksterlandulo.)**

(8) Of course we know that **haro** means a single hair. In **Universala Vortaro** the collective noun **hararo** is often given. This last is quite frequently used by the inexperienced in the sense of "hair" (a head of hair). Now **hararo** was intended by Zamenhof to cover the special sense of "a wig," as shown by the translations following the word. As a matter of fact there is not a single instance in all the writings either of Z. or Kabe of the use of **hararo** in any sense. **Peruko** has long been the approved word for "wig," and as for natural hair in the collective sense the classic writers use **haroj.**

(9) The most abused of all affixes is **-ig,** it is used so often superfluously. It is properly used to render an **intransitive** verb transitive (and **very** occasionally to make a transitive verb "doubly transitive.") Such words as **levigi, turnigi, vekigi** for "to raise, to turn, to wake up (someone or something)" are incorrect, as simple levi, turni, veki, etc. are already transitive. Always be sure a verb is intransitive before you think of tagging on an **-ig,** Similarly, as **-iĝ** is used to make transitive verbs intransitive, be careful not to use it superfluously (tho there is less danger here than in the case **-ig**).

(10) Do not intermix **kio** and **kiu, tio** and **tiu,** and the like.. The **-o** series are **never** adjectives. Beware of such expressions as "**tio ĉi** libro estas bona."

Digitized by Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

(11) When to use **koni** and when **scii** is apt to be puzzling to the English speaker. **Koni** and **scii** convey practically the same general idea, that of "knowledge," only **scii** is the stronger word, meaning "exact or perfect knowledge" — it is, so to speak, the top rung of a ladder, whose lower rungs are all "koni's." In practice, use **koni** with persons always, and with things also unless the knowledge is exact. Before a **ke** and clause **scii** is always used because here the knowledge is always definite.

(12) Distinguish **mastro** and **majstro,** the former implying mastery of something **concrete,** as of a servant, horse, or house, the latter mastery of **ideas,** as of a language, trade, or profession.

(13) Never use **miri** in rendering such an idea as "I wonder if that is true." Such a use would be a literal translation of a purely English idiom. Not "mi miras" but "mi scivolas, ĉu tio estas vera."

(14) **Nepre** means "without fail," as **nepre venu,** "be sure to come." Beware of using it in the sense of "absolutely," as for "that is absolutely true" — here the correct adverb would be **tute** or **absolute.**

(15) Distinguish carefully **elpensi** and **eltrovi,** the former meaning "to invent," the latter "to discover."

(16) Remember that **ami,** like the Fr. **aimer** and Germ. **lieben** covers both "love" and "like." Do not use **ŝati** for the former sense. **Ŝati** is a much stronger word, meaning to "cherish" or "appreciate." Note Kabe's Vortaro and the classic writers.

(17) The best dictum we have seen with regard to the indefinite suffix **-um** is Alfred Wackrill's, L. K., namely not to build any words with it on one's own initiative, but merely to use those already created by Zamenhof in **Universala Vortaro** and his writings.

S-ro Deligny, D. D. de U. E. A, rue de Belfort, St. Omer, France, estos feliĉa akcepti Esperantistojn amerikajn kiuj trapasos aŭ enloĝos lian urbon.

Skribu, se eble, por fiksi rendevuon.

---

## ANSWERS

## TO CORRESPONDENTS

Q. Explain the meaning of the word **Usono.**

A. **Usono** is historically a unique word in Esperanto. Some twenty years ago a New York newspaper, The Times if we mistake not, published a proposal that instead of the cumbersome phrase "United States of North America," which alone accurately designates our country, we should in default of a better term make up a word from the initial letters of the phrase, i.e. U-S-O-N-A, and use that as a brief, euphonious, and distinctive name. As would naturally be expected, the public paid no attention to so radical a suggestion from an obscure individual. But it chanced that this suggestion (how we know not) came to the attention of Prof. Th. Cart, editor of that pioneer Esperanto journal **Lingvo Internacia.** As previously our land had been known thruout Esperantujo as **Unuigitaj Ŝtatoj de Nord-Ameriko,** it occurred at once to Prof. Cart that here was a chance to incorporate in the growing language an excellent idea. So the last letter of Usona was merely changed to -o to conform with grammar, and thus came into being and soon spread into universal use the Esperanto word **Usono,** a more convenient and accurate term for our country than is found in any national language.

Digitized by Google Original from PRINCETON UNIVERSITY

# MAGAZINE SUBSCRIPTIONS

**REMEMBER** that we take subscriptions for any magazine published in the United States or Canada.

On many of these we can give you a considerable discount from the publisher's price — and under special club arrangements make some very attractive combinations.

Send for catalog.

**THE AMERICAN ESPERANTIST CO., Inc.**

WEST NEWTON - - MASSACHUSETTS


Digitized by Google

Original from
PRINCETON UNIVERSITY